# KATOLIKA SENTO




6

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV

**KATOLIKA SENTO**
BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)**
**Anno 50° - 1971**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

**KATOLIKA SENTO**

Nº 6 - Junio 1971

50ª jaro

DUM LA ĜENERALA AŬDIENCO de la 26-a de majo, la papo parolis pri Pentekosto. La parolado de la papo ŝajnis al ni tre grava kaj interesa pro la ĝenerala temo kaj ankaŭ pro ĝiaj flankaj konsideroj. Pro tio ni volas aperigi ĉi tiun numeron per ĝia traduko.

"UNU EL LA PLEJ GRAVAJ, KARAKTERIZAJ, fekundaj instruoj, kiujn la dua Vatikana Koncilo liveris, estas tiu de la mistero de la eklezio, kiu konsistas en ĝia vivo, per kiu ĝi estas la vera mistika korpo de Kristo; kaj ĉi tiu vivo devenas de la enverŝo de la Sankta Spirito, la Spirito de Kristo. Ĉi tion oni sciis, ni diru, de ĉiam, de la Pentekosto, de la doktrino de la Patroj, de la freŝaj papaj dokumentoj kaj de kleraj teologiaj studoj. Sed la eklezia doktrino orientiĝis pli al montro de la eklezio mem laŭ ĝia aspekto videbla kaj socia, sekvante la Tridentinan Koncilon kontraŭ kelkaj herezoj de la Reformo. Ne volante malagnoski ĉi tiun aspekton, eĉ, levante ĝin al konsidero de signo kaj ilo de savo, la Dua Koncilo altiris atenton sur la aspekton spiritan, misteran, dian de la eklezio. Se ni volas esti sekvantoj de la koncilaj instruoj, ni devas kreskigi nian scion pri la Sankta Spirito. Ekzistas nova vasta literaturo pri ĉi tiu mirinda kaj tre fekunda temo. Ĉi tiu literaturo ne nur esploras la teologiajn indikojn pri la Sankta Spirito, sed precipe la rilatojn, kiujn la Tria Persono de la tre Sankta Triunuo havas kun la eklezio kaj kun ĉiu animo. Tiel estas al ni memorigitaj la titoloj, kiuj kvalifikas la agadojn de la Sankta Spirito por

la homaro elaĉetita kaj elaĉetenda merite de Kristo: li estas esence la Sanktulo kaj la sanktiganto; li estas la Parakleto, tio estas nia patrono kaj konsolanto; li estas la viviganto, la liberiganto, la Amo; li estas la Dia Spirito, la Spirito de Kristo, la nekreita Graco, kiu loĝas en ni kiel fonto de la kreita graco kaj de la efiko de la Sakramentoj; li estas la Spirito de la Vero kaj la Unueco, tio estas la principo de la komuneco, pro tio la fermento de ekumenismo; li estas la ĝojo de la dia posedo, la disdonanto de la sep donacoj kaj de la karismoj; la fekundanto de la apostolado, la forto de la martiroj, la interna inspiranto de la eksteraj instruantoj, la unua voĉo de la Doktrino, la supera aŭtoritato de la hierarkio; li, fine, estas la fonto de nia spiriteco: fons vivus, ignis, caritas, et spiritalis unctio.- Ni estas en la tagnaŭo de Pentekosto - diris la Papo- .Pro tio la parolado devus pritrakti la sentojn de la animo, necesaj por pli bone celebri ĉi tiun unuarangan feston de nia katolika kulto: la "metropolon de la festoj", kiel nomas ĝin S.Johano Krisostomo;kaj por ne fariĝi malindaj de la plej elstara donaco, kiu estas la Sankta Spirito; ĉar donaco estas efekto kaj signo de amo. Kiel oni povas ricevi ĉi tiun Donacon, kiu estas Dio mem komunikiĝanta? La plej bona preparo estas montrita al ni per tiu atendo, kiun la apostoloj kun Maria kaj kun la disĉiploj pasigis en la Vespermanĝejo,restante tie, ĝis la plenumo de la lasta promeso de Kristo, antaŭ lia ĉieliro: Ke ili atendu, li diris al ili, por baptiĝi en la Sankta Spirito post malmultaj tagoj. Kaj ili atendis, fidante la vorton de la Sinjoro, kunigite en preĝado. Oni devas havi malfermitan animon, tio estas, purigitan per pentofaro kaj kredo, pripensante la senton de la tempo, de la horo de Dio, tio estas en silento kaj samtempe en karitata unueco kun la fratoj,

kun la beata patrino de Jesuo, Maria. La pieco al Maria, oni povas aserti, komenciĝas ĉi tie, kiam estas naskiĝanta la mistika Korpo de ŝia dia Filo, kies fizikan korpon ŝi naskis. Kaj triobla motivo de elstara intereso estas oferita al nia spiriteco: la Spirito, Maria, la Eklezio. - Ni ne povas forsilenti ĉi tie alvokon: neniam disigu la elementojn, tre diversajn, ja, sed destinitajn por komponi sintezon el mirinda komplementeco antaŭdisponita per dia desegno. Havu en la supro de via kulto, precipe de la interna, la Sanktan Spiriton; kulto, kiu ĉefe montriĝos en la vigla, kortremanta atento pri ĝia ricevo, pri ĝia posedo: "dolĉa gasto de la animo"; laŭ katekismaj kaj realismaj terminoj: zorgu, ke vi estu ĉiam, ĉiam en la dia graco! Kaj ne aŭskultu tiujn, kiuj pretekste forpreni senutilajn malkvietiĝojn, kaj ĝenajn konscienc-skrupulojn, penus persvadi vin, ke ne estas necese revenigi la animon al la dia graco antaŭ ol ĝi sidiĝu ĉe la eŭkaristia tablo, aŭ por vivi kiel honestaj kristanoj! Kaj neniam malvarmetiĝu via pieco al Maria, la privilegiita donacintino de Kristo al la mondo, kaj spirita patrino de la eklezio en la verpermanĝejo! Kaj fine ne disigu la Spiriton el la hierarkio, el la institucia strukturo de la eklezio, kvazaŭ ili estus du kontraŭaj esprimoj de la kristanismo, aŭ kvazaŭ la Spirito povus esti ricevita senpere de la alia, la eklezio, kiu estas la kvalifikita ilo por la vero kaj la graco; la Spirito, ja, blovas kie li volas; sed ni ne povas supozi, ke li venas al ni, kiam ni estas propravole ekster tiu perilo, fiksita de Kristo, por komuniki lin al ni: kiu ne aliĝas al la Korpo de Kristo, ni diros kun S. Aŭgusteno, tiu foriĝas el la sfero animita per la Spirito de Kristo".

CENTRO ESPERANTISTA CATTOLICO ROMANO
N° 94

ALIĜIS AL UECI-CECR KUN LA BULTENO: Romo: J.Christiaensen; Cesena (Forlí); B.Benini; Cittadella (Padova): D.Fabris; Aŭstralio: V.J.Timmins; Belgujo: J.Toint; Ĉeĥoslovakio: J.Petrlik; Hispanujo:J.Guzman; M.Martinez; Esp.Gr.Balaguer; J.Cerezo Perez; Hungarujo: A.Szoboszlay; Nederlando: S.P. Smits; Pollando: J.Wicinska/ Entute: 389.

PASTROJ, KIUJ INTENCAS ALIĜI, povas celebri unu meson intence de p.Jacobitti, nur avertante lin pri tio. Aliaj personoj, kiuj preferas tiun aliĝmanieron,povas peti la samon de katolika pastro - kiel supre dirite - sed estas petataj sendi al p.Jacobitti konfirmon,se eble pri la celebr(i/o)ta meso, subskribita de la pastro. Tiuj, kiuj eĉ ne tiamaniere povas fari, kaj tamen ŝatas la bultenon, petu de p.Jacobitti ĝian senpagan sendadon.

BONFARA KASO: E.Sias: 1.000;A.Szoboszlay 10.000 Restas:32.325.

NI ATENTIGAS, ke niaj kunvenoj ripetiĝos dum la kvar dimanĉoj de ĉi tiu monato: poste ili estos interrompitaj ĝis la unua oktobra dimanĉo. Dum la lasta kunveno antaŭ la fermo, la 27-an de junio, s-ano Luigi Minnaja salutos kaj bondeziros al feriontoj.

RADIO ROMA - ESPERANTO. Junio 1971-a.
Dimanĉon la 6-an: Esperanto kaj filatelio; la 13 - an ; Grosseto, urbo de la ĉijara Itala Esperanto Kongreso; la 20-an: La kliniĝinta turo en Pisa; la 27-an: La an-

tikva etruska popolo. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". La dissendojo kazas de h. 21.00 ĝis h. 21.2° (Mezeŭropa tempo). Ondlongoj m.: 30,90 - 41,24 - 50,08.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

El Romo, centro de la katolika mondo, kelkaj informoj pri la vivo kaj agado de l' eklezio:

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

LA APOSTOLA LETERO "Oktogesimo adveniens anno" (okaze de la Okdeka datreveno), kiun Paŭlo VI adresis al kard. Maŭrico Roy, prezidanto de la Konsilio de Laikuloj kaj de la papa komisiono "Justeco kaj Paco", estas grava dokumento pri la socia doktrino de la katolika eklezio. La letero celebras tiamaniere unue la datrevenon de la encikliko "Rerum novarum", aperinta la 15-an de majo 1891-a, en kiu papo Leono XIII unua majstre alfrontis la socian problemon, sub la lumo de la doktrino de Kristo. Ĝi estis baza ŝtono, sur kiun la eklezio konstruis iom post iom, disvolvante la doktrinon laŭ la postuloj de la tempoj. La encikliko de Leono denuncis "la maljustecon de la laborista kondiĉo en la naskiĝanta industria socio", kaj samtempe prezentis la unuan sisteman tutvidaĵon en la historio de la kristana doktrino, koncerne la ekonomian kaj socian vivon. Pio XI en la 1931-a per la "Quadragesimo anno" pluiris en la instruado pri la socia justeco celante ordigon de ŝtata ekonomio rilate al komuna bono; Johano XXIII en la 1961-a per encikliko "Mater et Magistra" donis kriteriojn por armoniigi laŭ justeco la ŝtatajn progresajn ekonomiojn ĝis monda skalo. Kaj Paŭlo VI en "Populorum progressio" pritraktis la temojn de la internacia solidareco, kiam la socia problemo fariĝis tutmonda. Okazis intertempe la

Koncilo, kaj "Gaudium et Spes" metis la bazojn por la papa komisiono "Justeco kaj Paco". Ĝuste al kard. Roy, ĝia prezidanto, estis adresita la papa letero, kiu, dife rence de la aliaj dokumentoj, ne estas encikliko, kvazaŭ por doni direktivojn al kompetentaj lokaj paŝtistaj organoj, kiuj pristudos ĝin por la konkretaj aplikoj. "Ĉar estas fakte malfacile doni unikan orientiĝon kaj proponi solvojn universale efikajn, apartenas al la kri stanaj kolektivoj, - diras la papo en la kvara paragra fo de la letero - analizi objektive la situacion de siaj landoj, prilumi ĝin per la neŝanĝeblaj vortoj de la evangelio, atingi principojn, juĝkriteriojn kaj agadliniojn laŭ la socia instruado prilaborita de la eklezio dum sia historio". La papa letero dividiĝas en tri partojn: du el ili ĉefe konstatas la diversajn situaciojn, la tria estas esplicite orientiga. Ĉi tie ni mencias nur kelkajn punktojn el la 52 paragrafoj de la letero. En sia enkonduko ĝi apelacias al postulo de pli granda socia justeco, ankaŭ por diversaj situacioj de la eklezio en la mondo. Fakte la eklezio ricevis speci fan mesaĝon por la homaro, kaj kapablas por ĉiu socia problemo proponi la solvon, laŭ la evangelia vorto. La zorgoj de la eklezio koncernas la problemojn de urbanismo, ofte okazo de morala malekvilibro kaj malriĉeco ĉe larĝa parto de la loĝantaro; al ĉi tiu suferanta homaro la eklezio ĉiam en la pasiteco, kaj eĉ pli hodiaŭ klopodas servi kaj helpi. Aliaj zorgoj estas por la situacio de la junularo kaj de la virino, proble moj streĉitaj de la urba kaj de la industria vivo. Apar te gravaj en la dokumento estas la instruoj, kiuj rila tas la laboristojn, socia klaso kiu pli kaj pli akiras konscion pri sia digno kaj siaj legitimoj aspiroj. Por defendo de ĝiaj rajtoj ili kreis sindikatojn, kies agado tamen devas esti singarda por ne trouzi siajn re-

alajn fortojn kontraŭ la bono de la kolektivo mem. Kvankam strikrajto - deklaras la papo - estas agnoskita, ĝi povas aŭskulti la tenton trudi tro pezajn kondiĉojn por la ekonomio de la socia korpo, aŭ por postuloj nete politikaj. Kiam temas, aparte, pri publikaj servoj, necesaj al la ĉiutaga vivo de tuta kolektivo, oni devos nepre kalkuli la limojn, trans kiuj la danĝero kaŭzita fariĝus tute malpravigebla". La dokumento renovigas la malaprobon de la diskriminacioj pro raso, deveno, haŭtkoloro, kulturo, sekso aŭ religio. La papo, memorigante la malfacilan situacion de la elmigrintoj, alvokas statutojn agnoskantajn rajton al elmigrado kaj al helpado de tiu suferplena homkategorio. Same li pledas pro la kreo de novaj industrioj pli kaj pli urĝaj pro la demografia problemo. Kaj li admonas, ke peni solvi tion, per maltuzaj rimedoj, propagando de kontraŭkoncipiloj aŭ de abortoj estas malmoralaj kaj grave eraraj vojoj. La papo ne volas silenti pri la sociaj komunikiloj, kiuj fariĝis nova potenco, tre utila al la progreso, se bone uzitaj; male, tre danĝera. Pri la politika socio, li admonas, ke neniu modelo estas perfekta; pro tio oni devas ĉiam esplori kaj perfektigi ĝin, kun respekto al la rajtoj de la aliaj; kaj ke politika agado devas sin apogi sur la specife kristana bazo, la unika, kiu povas garantii sian efikon: amo kaj solidareco. Aparte li memorigas, ke ideologio marksista, ĝia sendia materialismo, kaj la liberala ideologio estis kaj estas kondamnitaj de la eklezio; kvankam oni devas distingi inter doktrinoj fiksaj kaj movadoj evoluantaj, en kiuj povas troviĝi pozitivaj elementoj. La papo admonas, ke la scienco, kiu hodiaŭ pli kaj pli progresas, neniam povos plene kontentigi. Ĝi plilarĝigas sed ne plenigas la homan menson. Nur la eklezio, kiu donas integran tutvidaĵon de homo kaj de homaro donas ankaŭ helpon por kompreni la planojn de Dio kaj kun

labori kun li laŭ la ĝusta direkto. Ankaŭ la progreso ĉiam celita, neniam plene atingita, ricevas lumon el la kristana credo. La fina alvoko rilatas la taskon de la eklezio en la socia kampo, celantan ne nur orienti gon de la spiritoj, sed ankaŭ impulson al agado por serco al la socio, esplorante ĉiujn eblajn konverĝojn por justeco kaj paco. Oni devas agnoski legitiman va riecon de rimedoj. La sama kristana kredo povas in diki diversajn solvojn. Pro tio la Eklezio petas de la kredantaro klopodojn por la duobla tasko: disvolvi vigle kaj kuraĝe la sociajn strukturojn kaj adopti i-lin al la veraj nunaj necesoj.

LA S.KONGREGACIO por la Dia Kulto diskonigis la novan Ritaron pri la konsekro kaj la uzo de la Krismo kaj la sanktaj Oleoj, kiuj estas uzitaj en la sakramentoj de la bapto, la konfirmo kaj de la ordino de sacerdotoj kaj de episkopoj; en la ŝmirado de la mal sanuloj kaj en aliaj sanktaj agadoj, per kiuj estas de diĉitaj al Dio objektoj destinitaj al kulto: preĝejoj, al taroj, sonoriloj, ktp. Inter la novaj dispozicioj, gra va estas la materio. Olivoleo estas preferata; sed tie, kie estas malfacile havi tion, ĉiu alia vegetala o leo taŭgas. Oni kutimis ĝis nun parfumi la oleojn per balzamo; sed en difekto de ĉi tio, oni povas parfumi ĝin alimaniere. Konsekranto de la Krismo restas an- koraŭ la episkopo, laŭ la dekkvinjarcenta kutimo; sed ĉiu sacerdoto povas beni la oleon de la katekumenoj, prefere ĉiufoje, laŭ uzado; la pormalsanula oleo po- vas esti benata de pastro nur ĉe urĝa kazo. La kris- ma meso estas ankoraŭ fiksita je la sankta ĵaŭdo; sed kie estas malfacile kunvenigi en tiu tago la pastrojn, tiu meso povos esti celebrita en alia tago proksima al Pasko. Ankaŭ la rito estas simpligita: nur unu pre

ĝo por ĉiu konsekro. Nur la preĝo en la meso por la kris
mosanktigo en kiu ĉiuj kuncelebrantoj etendas sian ma-
non sur la krismon, estas pli ampleksa.

LA ĜENERALA SEKRETARIO de la episkopa Sinodo,
mons. Ladislao Rubin, donis la 21-an de majo dum pres
konferenco la unuajn oficialajn indikojn pri la proksima
sinoda asembleo. La partoprenontaj patroj estos 212-213;
140 elektitaj de la episkopaj konferencoj, 14 reprezen-
tantoj de la Orientaj eklezioj kaj 10 de la reliĝiuloj; 19
prezidantoj de ekleziaj fakoj, la ĝenerala sekretario ,
kaj krome aliaj ekleziuloj, maksimume la dekvina pro-
cento de la totalo, elektitaj de la papo. Oni komencos
pere de pritraktado de la "ministeria sacerdoteco"; se
kvos la temo pri "justeco en la mondo"; poste proponoj
de la episkopaj konferencoj pri la "lex fundamentalis" .
La Sinodo komenciĝos la 30-an de septembro, kaj daŭ-
ros almenaŭ kvar semajnojn. Unue en plena asembleo,
raporto de la temo kun la ĝeneralaj rimarkoj pri la opi-
nioj de la diversaj episkopaj konferencoj; poste la dis-
kuto, kiu permesos al la episkopoj la prezentadon de la
vidpunkto de sia nacia grupo. Sekvos kunsidoj laŭ la lin
gvaj grupoj, kaj fine oni formuligos kaj oni voĉdonos la
rezoluciojn. Ĉeestos ankaŭ, kiel aŭskultantoj, kelkaj sa
cerdotoj, reprezentatoj de siaj kunfratoj. Ili tamen po-
vos libere pritrakti siajn postulojn en la lingvaj grupoj.
Oni penis ĉefe, ke oni ne pezu sur la Sinodo per antaŭ-
pretigitaj solvoj. Tiel la eklezia komuneco kaj la prin-
cipo de kolegeco havos sian profundan kaj fekundan si-
gnifon.

DU GRANDAJ KARDINALOJ lasttempe estis alvokitaj al
la premio de la fidelaj servantoj de Dio kaj de lia ekle-
zio. La Irlanda kard. Mikaelo Browne, kiu mortis la
31-an de marto 1971, jam ĝenerala superulo de la Domi
nika ordeno kaj rektoro de la Universitato S. Tomaso.

Dum la Koncilo li rolis la gravan taskon de la difino de la teologia doktrino dum ĉiuj debatoj. La 16-an de majo mortis la Armena kard. Agagianian, kiu, kiel Prefekto de la S. Kongregacio "De Propaganda Fide" kaj pro la kono de multaj lingvoj, vizitis senlace la plej malproksimajn landojn de la mondo. Ambaŭ estis membroj de diversaj Sanktaj Kongregacioj.

RELIĜIULINOJ EN ROMO estas entute 20.500; el kiuj 15.000 votintaj, kaj la aliaj novicinoj, postulantinoj aŭ aspirantinoj. El la 579 religiaj institutoj, la domoj estas 1061. 24 pri papa klaŭzuro, 1037 pri aktiva vivo; 174 pri ĝeneralaj domoj. Pri la agado: 7 domoj estas por spiritaj ekzercadoj; 149 por socia apostolado; 128 por orfaj infanoj; 11 por blinduloj aŭ surdmutuloj; 66 por maljunuloj; 85 klinikoj, el kiuj 33 apartenantaj al la institutoj, ktp. La lernejoj gvidataj de la reliĝiulinoj estas 349 (36 viraj kaj 313 virinaj kun 97.000 gelernantoj (el kiuj 61.000 vizitas la elementajn lernejojn, kaj 36.200 la superajn). 11 lernejoj okupiĝas pri formado de katekistoj.

KIO ESTAS "OPUS DEI" ? Legante la enkondukon de "Vojo", la esperanta traduko de la meditlibro jam aperinta en dudeko da lingvoj, oni trovis mencion pri tio, kaj oni petis de ni informojn kaj opiniojn. Volonte ni faras tion. Aŭtoro de la poŝformata libro (999 pormeditaj sentencoj) estas mons. Josè Maria Escrivà de Balaguer, fondinto ankaŭ de "Opus Dei". Li loĝas en Romo de 1946, kaj lia religia asocio hodiaŭ disvastiĝis en sepdekon da diversaj nacioj. Ĝi estas unu el la plej originalaj spiritaj fenomenoj de la aktuala eklezio, celante "sanktiĝon per la laboro, sanktigon de la laboro, sanktigon de la medio. La spirito de ĉi tiu asocio estas la evangelia vivmaniero en la plej diversaj vivkondiĉoj; tio estas forlasante nek sian laboron, nek sian

medion, sed serĉante Kriston en sia propra ĉiutaga vivo. Pro tio ne temas pri ordeno aŭ pri institucio, kiu forprenas la homojn el la mondo, sed prefere pri iu religia vivmaniero, kiun oni povas sekvi en la mondo, en sia hejmo, en la publikaj servoj, en la laboro aŭ komerca agado. Ĝi akceptas membrojn, vivantajn en la geedza vivo, samkiel kunlaborantojn laŭ plena servo. Ĝia karaktero estas fideleco al la evangelio, al intensa preĝado, al la eklezia instruado, al la sakramentoj, precipe al eŭkaristio. En ĉi tiu kadro la asocio respektas la plenan homan liberecon. Ĉiu malkovras sian vokiĝon al la sankteco kaj al la sanktigado, renkontante ĉie Kriston, servante en ĉiu medio al Kristo. Kompreneble, ofte homoj vivantaj en tiu fervora religia idealo, decidas kunigi siajn klopodojn por apartaj sociaj celoj, kaj kreas entreprenojn edukajn, asistajn, k.s. En Romo, ekzemple, ili kreis la "Klubon 91", kie junuloj povas praktiki aermodelismon, fotadon, sporton, ktp.; la centron "ELIS" (por Eduko, Laboro, Instruado, Sporto); la Hotellernejon en la virina sekcio; RUI kaj Vilaon de la Palmoj: universitataj pensionoj por studentoj kaj respektive studentinoj; ktp.

LA KATEKISTOJ EN LA tuta mondo estas pli ol 133.000. Tion informis la 25-an de majo agentejo "FIDES", rimarkante, ke la plej parto el ili troviĝas en Afriko kaj en Azio. Fakte sepdek mil katekistoj laboras en Afriko kaj en la nura Hindujo ili estas kvindek mil. Komisiono de la Papa Pormisia Entrepreno, kiu kunvenis antaŭ kelkaj tagoj, pritraktis ankaŭ ĉi tiun temon, kolektante ĉiujn eblajn informojn por kunordigi pli efike la kristanigan kaj asistan agadojn. La komisiono decidis, ke parto de la fondusoj kolektitaj por la misioj en la tuta mondo, estos destinita por la kvalifiko kaj la preparo de katekistoj.

EN KAPITOLO, LA ROMA komunuma palaco, estis premiitaj la plej belaj sanktaj Kripoj de la 1970-a. La ceremonio, organizitan jam la sepan fojon zorge de la dioceza Poreduka Ofico, malfermiĝis kun papa mesaĝo. Al la 67 venkintoj estis donitaj la antaŭfiksitaj premioj kun la diplomoj subskribitaj de la papa Vikario por la Urbo, kard. Anĝelo Dell'Acqua. 4 el ili ricevis specialan premion kun solena laŭdo.

OKAZE DE LA 750-a datreveno de la Tria franciskana ordeno kunvenis tutmonda pilgrimo al Romo de 15 mil triordenanoj. La institucio, ekstariĝinta en la maja monato de 1221, reprezentas la unuan ekzemplon de organizado de laika apostolagado en la eklezio. En la aparta aŭdienco, kiun la papo donis al ili la 19-an de majo, li adresis al la partoprenantoj tri atentigojn: "Kiel ilia patro sankta Francisko, ili praktiku malriĉecon en ĉi tiu mondo, kiun ofte oni vidas tiom zorgoplena pro ekskluziva kaj supera strebado al riĉeco, kun sekvaj sociala j konfliktoj, kaj antaŭ ĝia egoisma kaj misorda trouzo. Ili amu la krucon, evitante la ĉefan tenton de nia tempo - ofte ankaŭ de nia kristana vivo! - forpreni de la evangelio la paĝon de la kruco. Ili estu fidelaj al la eklezio, en kiu ŝajnas, ke ĝuste la filoj klopodas malkonstrui la mistikan kvankam tempan konstruaĵon!"

ENMEMORE DE LA ALTA RELIGIA, civila kaj humana valoro, kio estis la proklamo pri S. Benedikto kiel ĉefa patrono de la tuta Eŭropo, okazis en Romo du gravaj eventoj: transdono, ĉe la Eŭropa Domo, kun la ĉeesto de la Diplomata korpuso akreditita ĉe la Sankta Seĝo kaj multaj aliaj aŭtoritatoj, de la "Tutmonda Sigelo", internacia premio merite de civila progreso, al la Abato de Subiako Egidio Gavazzi, kaj la fondo de la unua Roma aktiveca Grupo de la Asocio "Sankta Benedikto Eŭropa Patrono", en la sidejo de la Cistercia ordeno.

"GEEDZIĜOJ INTER KATOLIKOJ kaj kristanoj kun diversaj nomindikoj, povas firmigi la movadon por la unuigo de la eklezioj". Tio asertas raporto publikita la 18-an de majo en Londono kaj prilaborita per komisiono de la konsilio de la Anglaj eklezioj kun reprezentantoj de la katolika Angla, Kimra kaj Skota eklezio. Tio ne signifas, ke oni povas laŭdi kaj kuraĝigi tiajn geedziĝojn, ĉar ili restas reala danĝero en la familia unueco; sed, ĉar ne estas eble ĉiam malhelpi ilin, oni devas almenaŭ klopodi por la sincera respekto al la du eklezioj. Kajtio povas efektive utili al ekumena evoluo.

DUM LA KONGRESO DE la komunista ĉeĥa partio okazinta en majo ĉe Bratislava, oni parolis kun maltrankvilo pri la allogo, kiun religio havas al junuloj. "Rimarkinda nombro da gestudentoj partoprenas en la religiaj diservoj - diris kongresisto,- kaj tio estas simptomo de la politika klerikalismo, kiu ekzistas en la universitataj urboj. En la regiono de Pezinok, ekzemple, la nombro de la studentoj, kiuj ricevas la religian instruon estas la 56 procento, kontraŭ la 35 de la ĵus pasinta jaro". La fina rezolucio rekomendas intensigon de la ateisma trejnado.

POR CELEBRI LA 25-an datrevenon de "Secours Catholique" (Katolika helpo), mil pilgrimantoj iris al Romo, kaj la 22-an de majo ili estis ricevitaj de la papo, kune kun la malsanuloj kaj la flegistoj. La "Secours" estas porasista asocio, kiu partoprenas aktive en la "Caritas Internationalis". Mons. Rodhain, prezidanto de la du organizoj, akcentis, ke la tuta eklezio hodiaŭ proponas al si la justecan tutmondan problemon, kaj la proksima Sinodo estos ĝia aparte signifoplena atesto.

LA MALPLIIGO DE LA NASKIĜOJ en Germanujo nete malkonfirmas la ekspertojn pri demografio - skribas d-ro Konrad Kraemer sur Katholische Korrespondenz de

la 30-a de marto. La naskiĝoj malpliiĝis, dank'al la"pi lolo", je 31 mil unuoj en 1967, 50.000 en 1968, 66.000 en 1969 kaj 93.000 en 1970. Tio signifas, ke en la du mila jaro la germana popolo malpliiĝos je sep milionoj. Kaj ĉi tio, anstataŭ favori la ekonomion, pligravigos ĝin, kaj jam multe antaŭ la fino de la jarcento. Ĉar iuflanke kreskos la necesaj helpoj al la maljunuloj, pli kaj pli nombraj, dum malpliiĝos la produktivaj fortoj. Tiam ĉiuj konvinkiĝos, ke riĉeco da infanoj estas riĉeco ne nur por la familio, sed ankaŭ por la tuta loĝantaro. Antaŭ ĉi tiuj perdoj la komisiono por la fiska reformo proponis, ke ekde 1974 oni apliku pli fortajn malgraviĝojn de impostoj: je 1.500 markoj (anstataŭ 1200) por la unua filo; 1980 (anstataŭ 1680) por la dua, kaj 2.400 (anstataŭ 1800) por ĉiu alia filo. Alivorte germana impostpaganto kun 3 filoj ĝuos malpezigon de unu miliono kaj 11.000 italaj liroj, kontraŭ la 150.000 liroj de italo en la samaj kondiĉoj. Sub la lumo de ĉi tiu situacio, pli kaj pli aperas oportuna la encikliko "Humanae Vitae" tiom kritikita de "fakuloj" pri demografio kaj de ekspertoj pri statistiko!

LA DIALOGO INTER KATOLIKA kaj Greka eklezioj estis agnoskita kiel bone enkondukita kaj marŝanta, okaze de la vizito de kard. Johano Willebrands, prezidanto de la sekretariato por la Unuigo de la Kristanoj, al la Ortodoksa sendependa Greka eklezio. La vizito, kiu konkludiĝis la 19-an de majo, estis la unua altnivela renkontiĝo inter katolikoj kaj grekoj ortodoksaj. Jam profesoroj pri teologio en Ateno, prezidantoj de religiaj asocioj kaj studentoj havis renkontiĝojn kun la katolika delegacio pri la diverĝoj inter la du eklezioj. La du partoj, konsciante pri la malfacileco de la celoj, agnoskis la neceson daŭrigi la promesplenajn dialogojn. Kard. Willebrands vizitos ankaŭ la ortodoksan ekle-

zion de Kandio kaj de Kreto. Post la reveno al Romo, li iros probable al Moskvo por la elekto de la nova ortodoksa patriarko.

LA EPISKOPA TRI-VENECILANDA konferenco prepare al la Sinodo decidis, la 12-an de majo, ke ĉiu loka eklezio de la tri veneciaj regionoj donos la unu procenton de ĉiuj siaj enspezoj por la landoj de la tria mondo. La proponon faris mons. Carraro, episk. de Verono, kaj estis akceptita de ĉiuj el la 14 episkopoj de la Tri-Venecioj, kun la interkonsento, ke ĝi estos submetita al la presbiteraj kaj paŝtistaj konsilioj, kiuj difinos la limojn kaj la manierojn de la efektivigo. Tiel ili intencas ankaŭ diskrete inciti la registarojn, ke ili atentu la proponojn faritajn de Paŭlo VI en "Populorum progressio" kaj en aliaj cirkonstancoj, kaj tiujn de UNO, por redukti la elspezojn superfluajn kaj detruajn, kaj por transdoni stabile helpojn al la subevoluintaj landoj.

PORNOGRAFIO ANKAŬ EN ITALUJO daŭre plivastiĝas. Estas ja vere, ke la artik. 21-a de la Itala konstitucio agnoskas al ĉiu "la rajton manifesti libere siajn pensojn buŝe, skribe, kaj per ĉiu alia komunikilo", sed ĝi ankaŭ deklaras, ke "estas malpermesataj prespublikaĵoj, spektakloj kaj aliaj manifestacioj kontraŭaj al la bonaj moroj"; kaj la artik. 529 de la puna kodo precizigas, ke oni konsideras "obscenaj agojn kaj objektojn, kiuj laŭ la komuna sento ofendas pudoron". Sed estas tre malfacile difini la komunan pudorsenton. Pro tio ne estas mirinde, ke juĝisto de iu urbo kondamnas, ekzemple, la saman filmon, kiun juĝisto de alia urbo permesas.

AŬTENTIKA ĜEMELIĜO SPIRITA estas inter Fajenco (Faenza, Italujo) kaj Varsovio pere de komuna pieco al la Virgulino Maria, honorata sub la titolo: "de la Gracoj". Fakte la Dipatrino, patronino de Fajenco, estis

vote homaĝita de la Varsovia urbo antaŭ kelkaj jarcentoj. Antaŭ nelonge kard. Wyszynski vizitis la sanktan bildon en la Fajenca katedralo, post kiampilgrimado de Fajencanoj vizitis la Polajn sanktejojn. En Romo ĉi ujare oni celebras meson, kun partopreno de Italaj kaj Polaj episkopoj, decembre, en la preĝejo S.Stanislao de la Poloj, kaj la komuna devocio al Maria firmigas la ligilojn de amikeco inter la du popoloj.

AL LA PILGRIMANTOJ, KUNVENINTAJ la 13-an de majo al Fatimo, en Portugalujo, por celebri la 25-an datrevenon de la kronado de la statuo de Maria, Paŭlo VI adresis mesaĝon, disvastigitan pere de radio kaj televido. "Hodiaŭ - la papo deklaris - ni spirite ĉeestas la memorigon de la feliĉa kaj nobla gesto: kiam la Portugalaj virinoj volis donaci al la Reĝino de la paco, kiel dankon - ĉar ilia patrujo estis savita de la danĝeroj de la milito - kronon elfaritan per iliaj juveloj. Bela esprimo de kristana sento, per kiu estis memorigata kaj celebrita la paco, - temo ĉiam aktuala por homoj de bona volo -; paco kiu ne konsistas el ekstera ekvilibro aŭ el jura ordo, sed kiu estas respekto kaj kunagado al la saĝa kaj ama plano de Dio sur la mondo".

LETERO DE LA ĜENERALA SUPERULO de la Blankaj Patroj, Teho van Asten, asertas, ke la evangelia predikado estas konstante opoziciita en la portugala Mozambiko. Tro ofte, li diras, paŝtistaj agadoj, precipe tiuj, kiuj rilatas justecon, estas konsiderataj kiel renversigaj de la naciaj leĝoj kaj kaŭzis eĉ malliberigon de kristanaj aŭtoritatoj. Prefere ol spekti ĉi tion pasive, ili decidis forlasi Mozambikon.

LA SUDANA REGISTARO FIRME intencas favori la religian liberecon. Tion konfirmis la ministro por la eksteraj aferoj Abu Elgasim Hashim al delegitoj de la

Ekumena Koncilo kaj de la Tutafrika eklezia Konferenco, kiuj la 15-an de majo vizitis lin en Kartumo. Hodiaŭ fakte Sudano estas en la fokuso de diskutoj kaj tensioj pri religio kaj raso. La delegacio restos unu semajnon en la lando; tiel ĝi klopodos renkontiĝi ankaŭ kun la ministro por la religiaj aferoj kaj vizitos la tri provincojn de la lando, kie la problemoj de la kunvivado inter araboj kaj negroj, musulmanoj kaj kristanoj, estas pli streĉitaj.

EL LA DU KATOLIKAJ ĴURNALOJ de Tanzanio, restos nur unu. Ĉi tiu estis, je la 8-a de majo, la decido de la lokaj religiaj aŭtoritatoj, kiuj intencis peni pli efike por la ĵurnalo "Kiongozi" (La estraro), rezignante al la alia "Ecclesia". Kiongozi estis fondita en 1951, kaj post la kolonia epoko estis la sola ĵurnalo de la ŝtato, skribita en la afrika lingvo Kiswahili. Ĉi tiu ĵurnalo estis preferata de la loĝantaro kaj ĝia prestiĝo kreskis ekde ĝi favoris la ŝtatan sendependon.

LA EPISKOPO DE HONDURASO adresis "alvokon al ĉiuj, por denunci la gravecon de la situacio". Antaŭ la ŝokanta kondiĉo de malriĉeco kaj senrajteco de granda parto de la loĝantaro, kaj antaŭ la akumulo de riĉeco en la manojn de malmultaj personoj, la episkopoj energie kondamnis riĉecon, kiel memcelon; ekspluaton, kiu aliigas homojn al varo, kaj la ruinigan egoismon de individuoj kaj entreprenoj. La episkoparo publikis ĉi tiun deklaracion okaze de la unua nacia simpozio pri la teologio de la libereco, en Tegucigalpo, la 12-an de majo.

STREĈITA SITUACIO INTER ŜTATO kaj eklezio en Peruo, kie la policaj aŭtoritatoj, la 11-an de majo arestis la helpepiskopon de Limo, mons. Luis Barbarèn Castelumendi, akuzitan de la ministro por internaj aferoj, ke li estas "militanto kun kleriksutano". La ĉefepiskopa si

dejo de Limo, kies titularo estas kard. Juan Landazuri Ricketts, energie protestis pro la malliberigo de mons. Barbarèn, konata kiel la "hepiskopo de la Limaj enbarakiĝintoj"; kaj la episkopo estis liberigita 12 horojn post sia aresto. Kard. Landazuri, kiu estis en Kostariko por vizito, revenis tuj al Limo por kontroli la situacion kaj kontaktiĝi kun la registaro. Temis pri la unua serioza kolizio inter la katolika eklezio kaj la militistoj, kiuj regas la nacion.

PRI LA AVANTAĴOJ KAJ LA EBLAJ danĝeroj de filmoj en la individua kaj en la socia vivo, atentigas deklaracio de la episkoparo de Portoriko: "Ĝi estas vera donaco de Dio, kiam ĝi estas rekte uzita, ĉar ĝi ne nur estas honesta distraĵo, sed ankaŭ ilo por eduki, por kunigi popolojn, sociajn klasojn kaj rasojn, por favori ekonomian, socian kaj politikan progreson, kaj eĉ por la disvastigo de la kristana mesaĝo en la mondon". Sed la episkopoj en la sama deklaracio plendas pro la emo de la internacia filmindustrio al sekso, perforto, krudeleco, sadismo kaj materialismo. Tio ĉio tre malaltigis ĝian moralan kaj edukan nivelon, kaj estas zorgoplena motivo por la episkopoj. Pro tio ili proponas principojn kaj rimedojn por prijuĝi kun kristana sento ĝiajn produktojn, por sin defendi de la danĝeroj de malbonaj filmoj, kaj por pretigi spektaklojn moralajn kaj samtempe allogajn.

LA BIBLIA ELDONO EN LA ANGLA moderna lingvo, zorge de la Biblia Amerika Societo, estigis en Usono eldoritorian rekordon. El la volumo titolita "Good News for Modern Man" (Bonaj novaĵoj por moderna homo) estis fakte venditaj 25 milionoj da kopioj dum kvin jaroj. Tion informis la antaŭ nelonge okazinta ĉiujara kunsido de la Biblia Amerika Societo en Novjorko, dum kiu oni ko

munikis, ke la totalo de la disdonitaj Biblioj en la 1970-a ektuŝis la 100 milionojn da unuoj, kun pliigo de 23 milionoj kompare al la 1969-a. - Laŭ ni ĉi tiu rekordo estas unu el la "signoj de la tempoj", per kiu oni ekvidas la agadon de la Sankta Spirito. Ĉar la dua Vatikana Koncilo, adaptiĝante al niaepoka starto al ĝenerala revizio de ĉiuj malnovaj, iam pace akceptitaj principoj, donis al la tuta mondo preskaŭ tertreman skuadon, kiu ankoraŭ kapturnigas nin. Grandega nombro da indiferentuloj vekiĝis kaj malkovris la realon de Dio kaj religio. Gazetoj dediĉis novajn kronikojn pri tio responde al la ĉiam pli vasta scivolemo. Spite de la krudaj eraroj liveritaj de la aplomba malklereco pri religiaj temoj flanke de multaj ĵurnalistoj, iom post iom estiĝis scivolemo, deziro de esploro kaj kontrolo; poste reĝustigo de eraroj, fine admiro. Laŭ ni oni povas el ĉi tio ekpercepti jam la planon de Dio, kiu revokas al si la homaron, sampaŝe kun la mirakla niatempa teknika progreso.

EN JERUSALEMO MALFERMIĜOS la 15-an de septembro, Ekumena Instituto, starigita laŭ deziro de la papo. Ĝi estos studocentro laŭ universitata nivelo, kaj apartenos samtempe al katolikoj, protestantoj kaj ortodoksuloj. Prezidanto de la Akademia konsilio estis elektita mons. Moeller, profesoro pri teologio en Lovanio kaj subsekretario de la Kongregacio por Kredodoktrino. Inter la membroj de la aganta konsilio de la instituto estas ankaŭ prof. Cullman, unu el la plej konataj protestantaj teologoj, kaj iam "observanto" dum la Koncilo. Krom la strukturoj por studo kaj esploro, komunaj estos la preĝlokoj: ĉiutage la liturgio de la Parolo estos komune, dum la eŭkaristiaj servoj estos celebritaj aparte, sur tri diversaj altaroj. La ekumena instituto klopodos kunlabori ankaŭ por alproksimiĝi al la u-

niversitato kaj studocentroj de la hebrea civileco kaj religio.

LA HINDA EKLEZIO PARTOPRENOS aktive en la agadoj por forigi malriĉecon kaj senokupitecon en la lando. Tion deklaris la Hinda episkopa konferenco ĉe Novdelio en dokumento pri malriĉeco kaj evoluo. La episkopoj atentigas, ke en Hindujo kaj en la tuta Azio urĝas veki socian konscion pri la mizeraj kondiĉoj, kiuj afliktas tiun grandan mondparton. La rezulto de la freŝdataj balotoj montris, ke la hinda popolo rifuzas la kastan spiriton kaj preparas novan epokon, malfermitan al la socia progreso... Tasko de Kristo estis ankaŭ mildigi la homajn suferojn; pro tio la eklezio daŭrigas ĉi tiun misiadon favore al la homa digno kaj al justeco. Kaj, kvankam la eklezio agnoskas, ke ne apartenas al si proponi konkretajn kaj teknikajn solvojn, ĝi reliefigas kelkajn problemojn: por helpi al la mizera stato de la parto plej neglektita kaj malriĉa de la hinda loĝantaro; por limigo de elspezoj; por enkonduko de ĝenerala instruplano cele al la progreso pri profesia kvalifiko; por subteno al la principo de priresponda patreco. La dokumento tamen admonas, ke neniu materia riĉeco kaj bonfarto povas kontentigi la homan koron. Nur la posedo de Dio, kio restos ĉiam la unua tasko de la eklezio meze de la hinda popolo.

EN LA OKTOBRA NUMERO DE 1970, kiam ni raportis pri la akuzoj kontraŭ rekrutado de religiulinoj el Kerala (Hindujo), ni povis jam doni niajn unuajn respondojn. Baldaŭ tamen la tre akra kontraŭkatolikeklezia kampanjo ĉesis kaj silentis, ĉar tro okulfrapa estis ĝia blufo. Post kiam ĵurnaloj kaj periodaĵoj kun tutpaĝaj titoloj kunpafegis pro la skandalo, en Italujo oni aŭdis la hindan ambasadoron ĉe Kvirinalo danke laŭdi

nian landon, kiu gastigis tiom da hindaj junulinoj, "libe regaj pri sia elekto antaŭ sia alveno en Italujon samkiel poste". Sed la S. Seĝo ne atendis tion, kaj tuj enkondukis siajn enketojn, unu pere de la papaj reprezentantoj en la landoj, kien estis aldirektitaj la junulinoj, la alia en Hindujo mem per speciala esplorkomisiono. Pri ambaŭ raportis la 13-an de majo P. Heston, Sekretario de la Kongregacio por Relîĝiuloj per preskonferenco. Li deklaris: "Ni povas oficiale kaj energie dementi, ke iam la junulinoj estis "venditaj" al institutoj. Eĉ, la plej granda parto de tiuj 1595 junulinoj, pridemanditaj, deklaris, ke ili estas tre feliĉaj pri sia vokiĝo, kaj ke sia rilatoj kun la superulinoj estas bonegaj. La kvanto de tiuj, kiuj ne sukcesis, 151, t.e. 9,4 procento, respondas al la grupo de tiuj, kiuj pro motivoj de sanstato, de nostalgio, aŭ aliaj, ne sindediĉis en reliĝia vivo kaj aŭ revenis al sia lando, aŭ estis helpitaj atingi diplomon kaj enkonduki decan laboron. Tamen la ekleziaj aŭtoritatoj decidis, ke oni klopodu kiel eble, por ke baldaŭ la formado de la hindaj junulinoj okazu en Hindujo mem, kaj tiel granda nombro da novaj religiaj hejmoj estu tie malfermitaj por la disvastigo de la kredo.

LA VIZITO DE LA PAPO al Indonezio altiris la atenton al la laboro farita konstante dum longa tempo fare de la eklezio por la progreso de tiu granda lando, kie la indiĝena loĝantaro vivas ankoraŭ laŭ preskaŭ pratempaj vivkondiĉoj. Ĉi tiu laboro iras el la katolikaj universitatoj ĝis la silenta kapilara agado de multaj gereliĝiuloj. Rimarkinda inter ĉi tiuj la aktiveco de la Orsolinaj reliĝiulinoj ĉe la plej foraj kaj malriĉaj vilaĝoj de la lando. Tiuj fratinoj en Indonezio estas preskaŭ tricent kvindek, el kiuj cent kvindek indiĝenaj. Ilia agado laŭ ilia regulo koncernas instruadon kaj asiston al malriĉuloj. Pro tio ili konstruis multajn lernejojn, el kiuj

kelkaj eĉ notinde vastajn. Sed multaj aliaj fratinoj vivas meze de la plej malriĉaj personoj, en hejmoj entute similaj al tiuj de la aliaj; plej ofte laŭ grupetoj de nur 4-5 personoj. Unu el tiuj fratinoj vizitas kaj flegas malsanulojn, alia instruas kudrarton, kuiradon, alia kamparlaboron. Ĉiuj instruadas katekismon, kaj neniam ili neglektas siajn komunecajn religiajn devojn. Ili spertis kun rimarkindaj fruktoj novan instrumetodon a parte adaptan al la kapableco de la indiĝenoj. Nome ili kunvenigas la lokajn knabinojn por du semajnaj kursoj; post kiuj ili revenas al siaj hejmoj por instrui siavice laŭ la lernitaĵoj patrinojn, fratinojn kaj la aliajn virinojn. Kaj en ĉi tiu tasko ili estas asistitaj de religiulino. Post monato la knabinoj revenas al la lernejo por nova dusemajna kurso; kaj tio ripetiĝas dek foje. En ĉiuj centroj, kie ĉi tiu instrumetodo estis aplikita, oni konstatis efektivan prosperadon de la tuta kolektivo. Al la knaboj, kiuj pro malriĉeco ne povus viziti lernejojn, ili donas eblecon de manlaboro laŭmezure de ilia kapablo, tiel ke ankaŭ ili sukcesu perlabori la necesan monon.

ĈE ZAA, APUD ĜIAKARTO (Indonezio), oni preskaŭ finkonstruis digon, kun helpo de 1050 laboristoj. Sed tio, kio instigis nin citi ĉi tiun fakton, estas, ke estro de la entrepreno estas misiisto de la "Dia Verbo", P. Hubert Hermens, eks-apostola prefekto de Bali- Lombok, nun parokestro en insulo Flores. Antaŭ kelkaj jaroj la lokaj aŭtoritatoj komencis tiun entreprenon, sed poste ili devis forlasi ĉion pro manko de monrimedoj materialoj kaj de teknikistoj. Tiam P. Hermes decidis transpreni sur sin la respondecon de la laboroj, kaj ricevinte la necesajn permesojn de la urba konsilio kaj la aprobon de la indiĝenoj, celebrinte meson por peti la dian helpon, li kuraĝe reprenis la kunordigon de la labo

roj. Interesa fakto estis ankaŭ la partopreno de bienuloj, kiuj akceptis doni la duonon de siaj posedaĵojn por la sukceso de la entrepreno, kaj la entuziasmo de la laboristoj, kiuj donas ĉiumonate tri senpagajn labortagojn. Post la plenumo de la entrepreno ĉiu laboristo aldone ricevos de la registaro terpecon kiel kompenson.

EN LA ORIENTA PAKISTANO, kie okazis la terura inundo la 12-13-an de novembro, kaŭzinta preskaŭ milionon da viktimoj kaj ĉirkaŭ 2 milionojn da senhejmuloj, la rekonstruoj estis planitaj tiel racie, ke oni diris, ke la ciklono havis ankaŭ sian providencan aspekton. Hejmoj kaj fabrikoj estas konstruitaj per armita cemento, kaj sur etaj altaĵoj anstataŭ la malnovaj bambuaj; oni kreis artefaritajn lagetojn por dolĉa akvo, antaŭe ne ekzistanta, kaj oni fosis diversajn putojn, tiel ke ankaŭ la agrikulturo jam donis la unuajn abundajn rikoltojn: oni antaŭvidas, ke ili baldaŭ kvinobliĝos. Grandaj digoj baros la marondegojn puŝitajn de ciklonoj, kiuj en tiuj regionoj estas hejmaj. Ĉar la loĝantoj vidas, ke teknikistoj kaj inĝenieroj, kiuj iris tien por direkti la laborojn tion faras por lasi la konstruaĵojn entute al ili, fervore kunlaboras, ne konante strikojn. Kaj ankaŭ la tre bedaŭrinda milito, kiu kaŭzas novajn terurajn detruojn al la malfeliĉa Pakistano, malmulte malhelpos la rekonstruaĵojn, ĉar la fondusoj kolektitaj eksterlande, ĝenerale ne estis donitaj al la registaro (en ĉi tiu kazo oni povus verŝajne dubi ĉu ili atingis sian pacan celon,) sed restis en la manoj de la organizintoj. Ankaŭ la italaj katolikaj esperantistoj, kiuj kunhelpis malavare povas prave ĝoji, ĉar efektive ilia mondonaco taŭgis por savo kaj ne por mortigo de homoj.

LA ĈEFEPISKOPO DE HANOJO, mons. Trin Nhu Kue, konsekris kiel episkopon mons. Paul Nguyen Nang, pro

ponitan per elekto de la pastroj el la diocezo Xa-Doai kaj de la antaŭa episkopo, de nelonge forpasinta. Ĉe la fino de la konsekro, kiu okazis en la katedralo de la vietnama ĉefurbo, la nova episkopo vizitis la komunistajn aŭtoritatojn kaj la ĉefministron Pham van Dong. La bedaŭrinda stato de izoleco kaj silento en kiu troviĝas la nordvietnama eklezio ne allasas sufiĉajn elementojn por prijuĝi la eventon, kiu estis diskonita nur de komunistaj fontoj. Estas konate, ke ĝis nun la katolikoj estis kaj ankoraŭ nun estas malhelpataj de la aŭtoritatoj; inter alie al la episkopoj ne estis permesite partopreni en la Koncilo nek, pli freŝdate, en la Tut-azia episkopa konferenco okazinta en Manilo. Ĉu ĉi tiu nova sinteno flanke de la komunistaj aŭtoritatoj estas malstreĉiĝa indico, kiu povus konduki al novaj rilatoj inter katolikoj kaj ne katolikoj? Ni kuraĝas tion esperi, kvankam oni konas la strategion de komunismo, kiu celas, laŭ la vortoj de la vietnama partia organo mem, Hoe Tap, "fari el la eklezio organizon obeeman al la politiko kaj al la ŝtataj leĝoj".

"Plejbone vi servos al ŝtato kaj nacio, se vi levos ne domtegmentojn, sed animojn de civitanoj, ĉar estas pli bone se grandaj animoj vivus en malgrandaj domoj, ol se malaltaj animoj kaŝatendus en loĝejoj grandaj.

Epiktetos

(El "Maksimino Universala" de B.Grim)

ABONO : £. 1.000 (Us.dol. 1,60)
Poŝtĝirkonto 3-7791 al: D.ro C. C. Ferrari
(aŭ) pĝk. 1-37638 al: P.Giacinto Jacobitti.